Krom KET en julio 2016 mi povas informi nur pri mia kreo de la kurso "Esperanto en 10 lecionoj" kiel bazon por videokurso. En KET mi informis pri preparita samcele pablik https://vk.com/public122862589 kaj petis reagi al ĝi (plaĉoj kaj disvastigoj). Sed tio ne okazis eĉ flanke de la partoprenintoj. Tamen malgrandan kurson mi faris por provi la novan metodon. Ĉisomere mi ripetis la kurson kaj aperis kelkaj brilaj novaj esperantistoj. Decembre mi kun 3 jaltaj esperantistoj flugis al Marokko, kie loĝis senpage en la Domo por liberaj vojaĝantoj. Ni konvinkiĝis, ke en la lando, kie oni tute ne uzas la anglan, bone helpis Esperanto. En la Domo mi prelegis por la vojaĝantoj pri Esperanto (1horon 40 minutojn)

Pri la agado de REU-estraro mi povas diri nur, ke oni agis, kiom povis. Tamen tute ne uzis ion novan por ŝanĝi la stagnadon. REJM tute ne agas. Necesas kunlabori kun junularaj movadoj. Ekzemple, Akademio de liberaj vojaĝoj (Moskvo) organizas dufoje jare Kunflugojn apudmoskve, kiun partoprenas centoj de junaj vojaĝantoj. Neniam moskvaj esperantistoj aperis tie por informi pri Esperanto.

Jefim Zajdman